



PENSEO

N-ro 256

feb. / 2013

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 24-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



blokado

abolitaj estas ĉiuj vojoj;
 la piedoj iras en la feraj pugnoj.
 la senforma reto pli grandas ol kosmo.
 fiŝoj ne povas ne sin manĝi.
 tro da grenoj igas buŝojn morti pro malsato.
 filantropioj kiel vermoj prosperas en suno,
 kie brulas la ostaro de la fratoj kaj fratinoj.
 la flago el sango super la tombejo flirtas ĉiam.
 gloroj kaj revoj ofte skribiĝas en la ŝtonoj.
 buĉu nin!
 ni estas ŝafoj sentestikaj.
 bonzinoj loĝas en vilaojn de kristanoj,
 ĥore kantante sutrojn por ke perfortantoj longe
 vivu.
 la pordoj estas ja ŝlositaj;
 semoj maturiĝu en la korto senpage vendita.



Leieladonna (Meksikio)



BLUJAJ TINTILETOJ

Blua ĉielo
 verda kampo,
 arkoj... sunfloroj...

el la surgrimemo de mia infaneco
 manĝante florojn...
 ipomoeajn...
 bluaj tintiletoj
 el dolĉa bongusto...

aŭ rubusoj...
 grimpante la arbon,
 sukero, akvo...

ludante kun koto kukaĵojn,
 saltante en la lagetoj...

la floroj...
 elvokante la infanecon
 feliĉa kaj malŝpara,
 la iroj al la lernejo,
 la jaroj de abundo,

la taskoj...

la pordegejo...

la koridoroj de mia lernejo
 multsonĝe mi vizitis,
 mi revenis tien...
 antaŭen kaj al malantaŭen...

la memoroj...



Mori (Usono)



Blasfemo

1.

Ĉu

Ĉu Dio
kreis homon,
aŭ homo
kreis Dion?
mi ne scias tion,
sed mi bone scias
ke je l' nomo de Dio
oni ofte faras
FION !

2.

Senhezite

Se mi devas
rompi koron
de l' homo
senmerite,
aŭ rompi
leĝon maljuste
farite,
mi tuj faros
la duan,
senhezite!

Petro Palivoda (Ukrainio)

Kompaso

mi iras suden
mi iras norden
mi iras orienten
mi iras okcidenten
kaj ofte devojiĝas
ĉar koro estas ja
kompaso nefidinda

Revo

Mi revis,
kiam estis infano,
suprenflugi en la ĉielon,
almenaŭ per aeroplano
(aeroplano sin levas supren –
kaj ĉiuj ne povantaj flugi:
domoj, arboj kaj fostoj kaj tiel plu –
iĝas tiom malgrandaj).

Aeroplano sin levas supren –
kaj ĉiuj ne povantaj flugi:
domoj, arboj kaj fostoj kaj tiel plu
kaj tiu, kiu ne revis,
kiam estis infano,
suprenflugi en la ĉielon,
almenaŭ per aeroplano –
iĝas tiom malgrandaj.



Paŭlo Silas (Brazilo)



NUTRI HOMAMASAN FRENEZON

Hitlera grandomanio flugpendas latente.
Ĉu ĝin la sudotropika maro ensorbis?
Ŝuldkont', dum centoj da jaroj, pezas
monumente.

Profiton multepromesan oni distordis.

Rezonkapablo bovgrega ilin plenregas.
Ni hipnotigos per oscilanta piedpilko.
En niaj vejnoj, Romana sango bolegas:
Ni homamasojn forlogos per pano kaj cirko

Por danci movoplenan ritmon priprogresan.
 Ŝajniku politikpretecon konsciencan,
 Ĉar servon registaran Demokrati' kontraktis.

Magiaj stadionoj pruvos la sukceson
 Al ĉiuj civitanoj, kiuj l' impostojn pagis.
 La mono-malŝparadon ili ja forgesos.



Dimitrije Janicic (Serbujo)



Larmo de junulino

4

RENKONTIĜO

Por ĉason prepari
 reĝo kavaliron sendis
 Paŭlo belulo
 ke li inter abioj
 trovu paŝtejojn de cervoj
 kaŝejojn de ursoj
 padojn de aproj
 nestojn de perdrikoj,
 akvokirloj kie fiŝoj vivas.
 Juna kavaliro
 tra montaro vagis
 ekvidis lageton
 en ĝi junulinon.
 Li fiksrigardis ŝin,
 perdis sin,
 enamiĝis,
 forgesis devojn

tempon, reĝon,
 dronis en ŝiajn okulojn
 kiel en ĉiel-senfinon,
 kiel en forgeson.
 Komence ŝi ektimis,
 poste forgesis
 vortojn de gepatroj
 ne rememoris
 ke ŝi estis nur en akvon vestita.
 Koro ŝia ektremis
 kaj poste kvazaŭ ĝi haltis,
 kaj okuloj renkontiĝis
 kaj enplektiĝis
 kiel ja deziroj
 kiujn ili ne direktis.
 Ekfloris amo.

5

AMO DE PAŬLO

Lin ebrigis ŝiaj lipoj,
 li enplektiĝis en ŝiajn orajn
 harojn,
 lin ĉarmigis lia brusto,
 varmigis sin
 kiam okulharoj-birdoj
 malfermis klarajn lagojn
 de ŝiaj okuloj.
 Milica,
 aminda junulino,
 kanto mia matena,
 dormokanto vespera,
 tago bela,
 al kareso promesita,
 feliĉo kaj forto miaj,
 pro vi mi emus
 batali kontraŭ gigantoj,
 por vi drakojn mi pereigus,
 antaŭ vi genuous
 petante amon,
 belulino mia.

Reĝo al batalo vokas min,
 eble min batalo englutos,
 rivero forportos,
 fajro bruligos,
 eble mi ne revenos

por novan vivon krei,
se tio okazos
mi mortos
kun via nomo
je miaj lipoj,
mia plej kara!

6

SONĜO DE MILICA

Milica malkviete sonĝas:
Alkreskis Lukovska rivero;
en sovaĝbeston transformiĝis
de monto al monto disvastiĝis,
derompas arbaron, ruladas
ŝtonojn,
subfosas vojojn,
detruas murojn,
plena de branĉaro, radikoj, koto;
kovras tutan valon,
ĉion portas al nekonateco,
renversiĝas en kota akvo
kadavroj de bestoj kaj homoj,
resonas valo kiel malsanulo,
tremas pintoj de ĉirkaŭaj montoj,
ruiniĝo de mondo, nova inundo,
morto rulglitas tra valo.
Ŝi – timigita birdo,
ne povas moviĝi,
ne povas ekkrii,
sensone kriegas
pro sia timo por Paŭlo.



7

PETO

Iu montaro
naskas fizotegiojn,
monumenton al malĝojo,
al mia larmo
kaj al larmoj de ĉiu junulino
kiu malsanas

pro amo nefarita.
Koron al mi ŝtonigis malĝojo
mi estu fago en ŝtono
kaj ŝtono
ploru anstataŭ mi
kaj miaj larmoj fluu
ne kiel rivero,
ne kiel ŝpruco,
estu akvofalo:
guto post guto,
ĝemo post ĝemo,
malĝojo post malĝojo,
plorĝemo post plorĝemo,
larmo post larmo,
ili rakontu
al montaro malĝojn.
Guto post guto
el ŝtono
tagon post tago,
jaron post jaro,
jarcenton post jarcento
ŝtono ploradu
per malĝojo junulina
per malĝojo de perdita amo.

MALBENO

*Oni diras ke junulino
en sian malbenon
enteksas forton de Tero.
Malbeno ŝia estas
peza kiel montaro,
forta kiel naturo,
detruiga kiel inundo,
varmega kiel Suno,
senkompata kiel destino,
konstanta kiel tempo,
neevitebla kiel maljuneco.*

* * *

Malbenitaj estu vi
kiuj forrabis lin!

Atingu vin miaj malbenoj
pro lipoj nekisitaj,
pro haroj netaŭzigitaj,
pro brusto netuŝita,
pro sonĝoj neforsonĝitaj,

pro revoj nefantaziitaj,
 pro malpacoj subpremitaj,
 pro infanoj nenaskitaj,
 pro aŭroroj neĝisatenditaj,
 pro padoj netransiritaj,
 pro junaĝo netravivita
 pro ludoj neforluditaj
 kaj deziroj neplenumitaj.
 Atingu vin mia malbeno;
 vi ne sciu pri amo,
 oni memoru vin laŭ malbono,
 fremda sango
 je via sojlo ekbolu,
 viaj prebendoj herbe kovriĝu,
 viajn palacojn kaŝu rubuso,
 ke via spuro ne restu,
 ke filo mortigu patron,
 kaj frato mortigu fraton,
 kaj ke ili neniam
 estu kontentaj.
 Malbeno ĉi tiu
 en mi maturiĝis, en mi estas
 matura,
 de mi al ŝtono donacita.
 Se aŭtuno ploras per pluvoj
 se Tero ploras per fontoj,
 tiam ja ŝtono esploru
 je mia nomo.



Ĝemadio (Germanujo)

Grizejo

La lumoj silentaj, el turoj vidate,
 briletas en nokto kontraste.
 Obskuras ĉielo, de l' sun' forlasate,

sed lumoj de l' urb' estas vaste.

Kaj turoj betonaj kaj vitraj kaj feraj
 la nigron ĉielan pikadas.
 En ĉi-tiuj turoj altecmalmoderaj
 la homoj ĝs nokt' laboradas.

Vaporon plej grizan en la atmosferon
 alblovas la mondo de l' homoj.
 Kaj tute samtempe la ter-biosferon
 detruas la ĉef-ekonomoj.

Nur unu arbet' en la urbo nun verdas,
 kaj jam la unuajn foliojn ĝi perdas.
 Pri tio la mondo de l' hom' ne avertas,
 do ĉiam konsciuj: Futuro ne certas.

Siv Burell (Sedio)



Mi protestas

Mi protestas kontraŭ ĉio:
 la eterna pluvado
 la sanstato de kamerado
 la dura vento
 mia malbona sento
 ke folioj abundas sur nia korto
 ke mankas al mi forto

Se ĉiam estus ja sunlum'
 kaj rido kaj ankaŭ ŝercum'
 ĉu ni tute do komprenis
 la feliĉon, kiu venis?

Eble donas suferad'
 humilecon pri traktad'
 de kunvivantoj kaj medi'
 revenu la feliĉ' al vi !

Lasu la protestojn
 aranĝu ĝojajn festojn!



Jacques Prévert (1900-1977)



JE HAZARDO DE LA BIRDOJ

Tremalfrue mi lernis ami la birdojn
tion mi iom bedaŭras
sed nun ĉio glatiĝis
ni interkompreniĝis
ili ne zorgas pri mi
mi ne zorgas pri ili
mi ilin rigardas
mi ilin lasas
ĉiuj birdoj klopodas kiel eble plej bone



ili donas ekzemplon.
Ne ekzemplon, kiel ekzemple Sinjoro Fortreso,
kiu tiom rimarkinde kuraĝece kondukis
dummilite aŭ ekzemplo de malgranda Paŭlo,
kiu estis tiom malriĉa kaj tiom bela kaj tiom
honesta cetere kaj kiu iĝis poste la granda
Paŭlo tiom riĉa kaj tiom maljuna tiom
honorinda kaj malbela kaj tiom avara kaj tiom
bonfaremula kaj tiom pia.
aŭ ekzemple tiu maljuna servistino, kiu havis
vivon kaj morton ekzemplodonajn neniam
ioman ajn diskuto ne tiom ! la ungo kiun oni
klakigas sur dentoj neniu diskuto kun la
Sinjoro aŭ la Signorino pri tiu abomeninda
afero de la salajroj
ne
la birdoj donas ekzemplon
la indan ekzemplon
la ekzemplo de la birdoj
birdoekzemplo
ekzemplo la plumoj flugiloj flugado de la
birdoj

ekzemplo la nesto vojaĝoj kaj kantoj de la
birdoj

ekzemplo la beleco de la birdoj

ekzemplo la koro de la birdoj

lumo de la birdoj

Elfrancigis



Roland Platteau (Francio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Vojaĝo al Tajvano

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

1. Al longe sopirata loko
trans la mar'
mi suriris jam
la teron nekonatan
sed intiman kun viv-gam'
sen ajna malam'

l' insulo
kun bela pejzaĝ'
riĉas kaj fruktodonas
invitas al la vojaĝ'
al sia miraĝ'

finfine
jen plenumis mi
la sopiron delongan
kune kun la famili'
por vizit' al ĝi

2. Yehliu geologia parko
ĉemare
groteskaj ŝtonoj
alloge punktatas dise
kun laŭtaj ondaj sonoj

—naturaj donoj	ŝanĝiĝis multe jame ja monde fame
turistoj kriadas kun mir' vete fotiĝas kune pro marpejzaĝa altir' aŭ gapa admir'	ne flirtas fumo incensa pro media protekto nur vizitfluo densa preĝado mensa
spektaklon kreas la natur' homoj ĝuas kaj spektas ĝoje kun granda plezur' des pli kun kor-pur'	5. Lun-suna lago ja vasta spac' de akvaro glimas per rulaj ondoj sub ĉiela blu-klaro —natura raro
3. Malnova rezidejo de Ĝjang Kaj-ŝek la gravul' jam forlasis for nur dom' ankoraŭ restas oni pri lia labor' kalkulas en kor'	nutritas ŝi per la lumo suna kaj luna vere vivanta en brakumo de nebul-fumo
loĝejo okcident-stila sidas en bela medi' kun kvieto trankvila sunlumo brila	navedas jaktoj leĝere glitante sur arĝento kun turistoj fiere ĝoje libere
la bosko plenas en ĝarden' je mirigaj sekretoj delikata pensfaden' skrupulo kaj ĝen'	ravite huraas ĥore turistoj jen plenĝorĝe foj-refoje fervore tre bonhumore
4. Moderna templo jen staras domeg' impona la trideksep-etaĝa kun tegmentpinto krona tintil' belsona	6. Monto Ali prosperas la verda mondo la ĉielon dividas arboj per tranĉa tondo sur alta monto
la templo tute malsame kiel tiuj antikvaj	sporade penetras lumo tra foliaro densa

vibranta kiel plumo
kun venta zumo

enspiras
homoj profunde
oksigenon puregan
tra la nazo abunde
rundo-post-runde

7. Sud-pinto de la insulo
senĉese
blovadas vento
ŝancelante turistojn
plorante kun lamento
sufoka sento

leviĝas
ondoj en maro
siblas herboj ĉeborde
arboj kurbas kun knaro
preskaŭ sen staro

sin sentas
oni komforte
sub pelado de vento
sed volvas vestojn forte
stumblas laŭsorte

8. Kanjono Taroko
langvore
fluas la river'
inter montoj apikaj
saltas trans rok-barier'
fole kun liber'

surkape
pendas danĝeraj
minacantaj rokmuroj
kun ŝtonglitoj misteraj
kaj faloj teraj

turistoj
ĉiu kun helmet'
kontraŭ ebla akcident'

iras per singarda tret'
kun kor-malkviet'

9. Pluvo en Tajpei
tre ofte
pluvas senĉese
piedantoj kunportas
ombrelon ja necese
—tre interese

sed tie
la pluv' ne ĝenas
se vi sub dom-arkado
aĉetas kaj promenas
ĉar arkoj ĉenas

la pluvon
ĝuas kun plezur'
oni nepoluitan
en pluvo-evita kur'
kun paŝa murmur'

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Senad Guraziu



(Kosova verkisto)

La adiaŭaj ŝuoj

La vespero havis ion vintrecan en si mem, tion Zgjim ne komprenis sed li havis ian senton kvazaŭ tio estis vespero du-tri tagojn antaŭ Kristnasko, vespero kun neĝoflokoj ie en Birmingamo, de kie li venis. Pasis jam 7-8 jaroj ke li vivas tie. Tamen ne, tio estis freŝa septembra vespero, ordinara Priština vespero. Bazite sur la mesaĝoj de Zana, tio estis la dua tago je freŝeco post kelkaj monatoj da sekeco kaj varmego.

Fakte, la Kosova ĉefurbo, asfiksita pro betono, estis same tiel asfiksita de pulvoro. Simile al la semajno antaŭe, al la monato pli frue. Tamen pluvetis- laŭ Zana. Ne mencio pri la pluvo post tiom da monatoj plene de varmego povus konsideriĝi kiel ia falsigo..aŭ klara mensogo de ĉi tiu rakonto.

La butikoj kie ili alvenis ne estis speciale por la ŝuoj. Mem Zgjim ne certis ĉu ĝi povus nomiĝi “butikoj”, ia Jumbo-butikoj, ia ega-super-butikoj....Ia ĉina malplenigita fabriko transformiĝinte al butikoj por ĉiuj varoj kune de Rumanio, Ĉinio, Bulgario, Turkio...Ĉiuj markoj “nemerkataj” je la stilo laŭĉina arigitaj en unu loko.

La plej granda butikoj de la postmilita Eŭropo por komfortaj ŝuoj, kvankam tie oni vendis ne nur ŝuojn. Iun pli grandan, samkiel iun butikodeponejon sen randoj, li neniam estis vidinta dum sia vivo.

Pli da spaco ne postulas eĉ la foiro de Frankfurto, nek iu Aero-Montrejo en Parizo, nek mem “ la seksoludiloj” en la foiro de Londono, Amsterdamo, Tokio- li pripensis ridetante dum li rigardadis la longajn ŝrankojn senlimajn de la butikoj.

La trafiko estis same asfiksita, kelkaj paŝoj ankaŭ la ĥaoso de la urba kolono reflektiĝis denove sur la vitroj, kvazaŭ denove tiu enuigita virino de la preterpasanta aŭto malrektiĝis sur ties vitro. Sed al Zgjim plaĉis “la malrapideco”, li neniam ĉagreniĝis pro la trafiko, ĉar tiuj momentoj ĉiam pli multe elektriziĝis per sia romantikeco, profumo.

Li eĉ ne atentis pri io alia ekstere. La tuta lia mondo, fizike, anime kaj mense estis tie en la aŭtovesto. La muziko estis ne nur konsolo por la trafikdenseco kaj pro fakto ke la aŭtoj estis degenerintaj kiel la konfuzitaj testudoj de la parko en Germio, la muziko samtiel estis ia trankviligilo de iliaj sentoj.

Zana mem provis kelkfoje trovi ion pli “agrablan”. Lastan fojon, tuŝinte la butonojn..ŝi signogestis ankaŭ al li ke finfine

estis kontenta pro la melodio. Nek ŝi estis streĉita, kontraŭe, tre rilaksita. Aspektis kiel iom malpeza, kiel kotona bela masko, kiel Barbi-pupo sidanta ne tie en la sidloko sed suspende en la aero. Fojfoje ridetis, per unu mano sur la stirilo kaj la alian ŝi enigis inter liaj manplatoj, rigardis lin kaj donacis la tutan rideton nur al li.

Tion ŝi diris per la plej dolĉaj okuloj de la mondo, per la plej belaj kiujn Zgjim estis iam vidinta.

Tiun vesperon, Zana aĉetis por li la adiaŭajn ŝuojn, aŭ pli precize, ili aĉetis kune. Ŝi preskaŭ insistis, kvazaŭ tiom multe estis entuziasmigita por aĉeti ŝuojn por li. Zgjim apenaŭ povis kontraŭstari al iu kiel Zana, kiel oni povus kontraŭstari la esprimadojn de ŝia vizaĝo. Tiun vizaĝon kiu kvazaŭ lumigis kaj plenbriligis la tutan ties estaĵon.

Al Zgjim tio ŝajnis anĝela vizaĝo sur la pentraĵoj, pura, hela, varma. Ne ŝajnis tiel nur ĉar li amis ŝin, nur ĉar li sentis pri ŝi. Laŭ li, ŝia rideto iel tiel donis lumon ankaŭ al la vojo antaŭen, eble pli ol la aŭtoprojektiloj. Ŝi mem estis tia, simple pro naturo estis bela estaĵo, freŝa, satigita je dolĉeco.

Ŝia voĉo, la varmeco de la rideto tenis lin, ekde tagoj, “ebriita”, neniel mensklara.

Sed nun la dolĉa voĉo sorĉigis ŝin eksterordinare kaj la sonoj de “La sekreta ĝardeno” elektitaj de ŝi, kvazaŭ retroiris surfone por ke profunde rifuĝu ie en la malnovaj ŝuoj survestitaj, aĉetitaj antaŭ du monatoj. Post kelkaj momentoj, oni donacis novajn ŝuojn, kiujn li bone sciis ke estos la adiaŭaj ŝuoj.

Tamen Zana ne sciis ĉi tiun detalon.

Kaj kun la ĉagreno ĝisrande maskita, li ĵuris ke survestus ilin ĝuste tiun tagon de la ekiro, tagon de la adiaŭo, kvankam la precizan tagon ne sciis. Li sciis ke sin disigus de kelkiu multe amata de li, por kiu li eĉ mortus. La tutan vivon li ekspektis renkonti ŝin, li povus morti

en kiu ajn tempo por ŝi. Tiom li sciis nun, kaj kvazaŭ ne volis scii ion pli.

Sed li sciis ankaŭ ke neniam rilatus kun ŝi eble serioze. Zgjim kredis en la amo, kredis tre multe. La pasinto de Zana, tion kvazaŭ igis neebla. Kvazaŭ io estis stampinta ĉe li ke tio simple “kredis al nenio”, kvazaŭ io el ŝia sonĝo estis balanciĝinta iamtempe, estis malaperinta. Ne sentis ŝi pri serioza rilato krom la bedaŭro. Li tion sciis, eĉ sentis, bone komprenis.

Zana havis vundiĝintan koron du-tri fojojn kaj apenaŭ “aŭdacis” ekpensi pri la amo, tio kvazaŭ terurigis. Zgjim estis aŭdinta ĉiujn ties “historiojn”, nun estis nur bonsortulo por ricevi la ŝuojn. Estis bonsortulo ekĝui dum kelkaj tagoj la profumon kaj la varmecon ŝian. Ŝi farus ĉion por li, donacus ĉion dum kelkaj tagoj, kaj eĉ la “koron”. Ne nur ĉar mem ŝi nenion perdis, sed ankaŭ ĉar ŝi eksentis iom da bedaŭro, ŝi konis koron de li.

Zana simple estis manipulinta “iom” per liaj sentoj. Estis manipulinta ankaŭ lin, samkiel ankaŭ sin, ne volante vundigi- aŭ, ne pensante bone ke ŝi povus vundigi. Volis ekhavi la vivon kiel ŝi perceptis ĝin, plenigi ĝin per travivaĵoj kiuj estis ne eblaj kiam ne estis “libera”. Por ŝi ĉio estis tiel kiel estis, fluaĵo de la vivorivero.

La konatiĝo kun Zgjim estis samtiel ia “someramo”, spontanea aventuro, “por plezuro” kiel ofte diradis ĉi tiun esprimiĝon en la konversacioj, rilate al ĉio.

Lastajn monatojn ŝi estis elvolvinta kelkajn siajn revojn al li. Parolis longe pri siaj disfaloj kaj nesorteco. Aŭ pli ĝuste: parolis pri ĉio, pri miliono da sekretoj. Eĉ ankaŭ pri la plej kaŝitaĵoj de sia koro, krom du-aŭ tri kozoĵ silentigitaj. Ekzemple, ŝi ne rivelis la motivon de la “riĉeco”, kiu nun estis la centra moviga forto de sia amo.

Rivelis nek la fakton ke li ne estis la sola pormomente “amikeca rilato”. Do, la ĉefajn kozoĵn ŝi ja ne menciintis. Ne ĉar Zgjim estis

naivulo, sed post longaj monatoj de interŝanĝo de sekretoj ankaŭ Zana havis okazon ekkoni lian koron. Tiumomente, rememoris pri maljunulino de “Titaniko” de James Cameron, la tuta filmo fakte estis ia konfeso de la bela protagonistino, nun en profunda maljuneco, surborde de la esplora ŝipo. Rememoris pri ŝiaj vortoj, “la koro de la virino similas al oceano plene de sekretoj, sennombraj sekretoj kaŝitaj en ties koro”.

Plimalpli, por Zgjim ĉio estis klarigite. Ekzistis nur iom da diferenco inter la realaĵoj kaj iliaj mondkonceptoj, li apenaŭ havis motivojn nek kondiĉojn, li povis ami ankaŭ tiel envane, senpostuleme.

Tiel kiel iris la aferoj, li simple devus kontentiĝi je tiome, pluresti amikoj...sed ankaŭ “amikoj” dividantaj la sekretojn kaj plezuraĵojn, kiun ajn sekreton. Kial ne eĉ pli ol tiom, se bezonate. Laŭ Zana tio estis amikeco kaj “ameco” moderna, kune. Io, ke se vi havas liberon kaj ne ekzistas rezono por plipretendi, ne estas malebla.

Zana, en multaj aferoj, kvazaŭ estis “erare influita” de serialoj je tipo “Sekso kaj la urbo”. Kvankam ne estis tiel, Zgjim simple maĉadistion en sia kapo. Se oni paraleligus la “antaŭenirintan feminismon” de Novjorka libera virino al la kliŝeoj de la “Moderna Familio”, eble oni akirus la Priŝtinan version de la “Sekso kaj la urbo”, kaj kial ne, ankaŭ Tirana-n version. Nin ŝajnigus ke “la libero” neniel estis malrektiĝinta en ŝiaj revoj, kaj nek “reflektita” malbone en la realo de la Kosova metropolo. Ĝiaj standardoj koincidus finfine al la “idealistiko”, al la Novjorka utopismo pri la etikoj altruditaj de la “eliteca aristokratio”, ĉar ĉio absorbiĝas aŭ falas en la centran standardon de la naturo mem- de la porekzista milito.

La naturo kaj la elituloj de la okcidenta avangardo, certe, ekiras de la samaj premisoj. Ekzemple, en la Naturo, ĉio diktita de ĝiaj leĝoj konsistas en tio, kiel atingi la statuson de

la “leonino” aŭ “leono”, poste oni povas piedpremi ĉiujn normojn kaj leĝojn de la ekosistemo, povas ilin neglegti, redizajni..eksperimenti laŭplaĉe kaj laŭ kiu ajn ideo en la kapoj de la leoneca elito. La aristokrata elito kreas modernan homon en Novjorko, Parizo, Londono, Tokio..modernan homon kiel ni konas, kiel ĝi prezentiĝas en la serialoj, en la filmoj de Holivudo, en la romanoj, reklamoj en miliono da revuoj de la mondo.

Kreas ĝin diktante la normojn, etikojn, emojn, politikojn, kulturon, modon kaj ĉion, milionon da kozo, sennombre da kozo. Ankaŭ la “Moderna Familio” kaj kiu ajn versio plej antaŭenirinta el la Priština morgaŭo, la samon faras, kompreneble laŭ Kosova “rimeno kaj poŝo” koncerne la antaŭenirojn. La samon faras ankaŭ Top Channel per ties neoriginaleco (estu eĉ la unuaj en ĝia klaso kiel kopiulo) per mil kaj unu kopiaĵoj, “luaĵoj” kaj plagiataĵoj. Tamen ne nur ili, la leganto mem analizu iom pli profunde mem la nomon TV-Klan kaj tuj klariĝos, ne bezonante pluen analizi. La samon faras Arjan Ĉani per sia “Libera Zono” elsarkante la vojon al la eliteca junularo, hardante ties modernajn “standardojn”. Tiel agas ankaŭ MTV je nivelo tuteŭropeca ekde la jaroj 90...se mi ne eraras pri ilia iniciato.

Tiel diktas la reguloj de kiu ajn antaŭenirinta socio, same en Parizo, en Priština, en Birminghamo. Je vortokaze, estus absurda se tio koncernus al la montaranoj de Qyqalla, aŭ malriĉuloj tie kie bojas la hundoj de Rezalla, ke oni proponu ideojn al la Priština leoneca elito...Aŭ el la kotplenaj getooj de Tirana, kelkiu kiel virkoko vendu pensojn kvazaŭ kaprofekaĵon de la kooperativo de Llakatundo al la elituloj de Bloko-kvartalo, bah, sensensaĵo!

Zgjim apenaŭ estis “ŝokigite” de iu ajn detalo de la kono pri la realo, nek de la kozosekvado koncerne lian romancon, sed ĉiam pli, tagon

post tago, li sentis sin trafite de abrupta doloro. Kvazaŭ li estis konvinkite ke neniam eskapus al sia nesorteco. Iumomente, kiam Zana estis rakontante ion vespermangante ie en ĉirkaŭjo, preskaŭ eksterurbe, ekvolis alparoli ironie ke li konsideris bona ke ankaŭ Priština moderna virino finfine estas supermodernigita ĉirkaŭbrakinte la plejn antaŭenirintaj standardojn (je deveno de elitoj de Okcidento).

Kial ankaŭ la albana socio ne havu standardojn, kial ĝi ne estu armeo de “socio-klonoj”, produkto de la moderna elito. Kial ne havu ankaŭ Priština sian version de la “Sekso kaj la urbo”, poste ankaŭ Tirana, kial postrestantu Tirana urbanaj.

Sed li bone sciis ke tio estis frenezaĵo alveninta el la surfaco pro lia ĉagreno, pro lia enuo. Sciis ke tio estis simple purega frenezaĵo sia.

Li ne volus vundi ŝin iam ajn, neniel, pro nenio en ĉi tiu mondo, tial ankaŭ apenaŭ eldiru iun vorton pro kio ŝi eksentus sin malbone. Ankaŭ ŝi estis dirinta la samon koncerne la “vundiĝon”. Li envere estis sentinta la bedaŭron en ŝia ĉirkaubrakado kaj, ekde tiu momento, kvazaŭ ekamis ŝin pli. Amis tiel kiel ŝi estis, kun ĉiuj ŝiaj konceptoj kaj skizoj pri la mondo, ekamus eble la tutan vivon. Eĉ li kvazaŭ provis malpezigi ŝian konscion dirante: “se mi vundiĝos, tio okazos ĉar mi estos vundinta min mem, via afero tute ne estas malfrua, kontraŭe...kaj estas tre dankema por tio, neniuj devigos nin korturmentiĝi kaj ĉirkaŭ ĝi, ni mem devas kontroli nian mondon de sentimentoj, la revoj estas ja revoj, la realo apenaŭ povas esti fabuleca, tiel ni ne estas infanoj kaj nek Disnilando, aŭ ne...”.

Li elreviĝis kaj rivelis ke nenio estis revo, estis nur li konfuzita, kuntirita pro la doloro. Restadis tiel tutan antaŭtagon, meditis kuŝante. Havis la trankvilon, solecon, aromon

de la floroj de la balkono kaj larmojn...ĝis ŝi revenu. Iom sin etendis eksteren en la balkono, kie li envere vidis la sekiĝantajn ŝuojn.

Lia menso iris al Vlora kaj sia patrino, ĉe fratino Ujeza kaj decidis denove reveni en Vlora dum kelkaj tagoj. Kial do tia sorto trafis min!- li pripensadis kvazaŭ volus konsoli sin. Dum la foriro mi transpasos ankaŭ du-tri landojn kun la ŝuoj surpiede. Sed krom aeroporto de Rinas, mi ne sentas sekurecon alie. Ĉar tiu dedektilo ilia por la metalaĵoj ofte envane bruas. Kaj certe unu el tiuj knabinoj aŭ iu junulo tre ĝentile ordonos min senŝuiĝi, zorgeme surmetos la ŝuojn sur aparato sed mi apenaŭ rezignos de ili.

Kiel infano kun larmiĝintaj okuloj li ĵuris ke konservos la ŝuojn tutan vivon. Ĵuris ke li zorgos pri ili, ankaŭ povus fari ion ajn kun ili. Ili jam estis la simbolecaj ŝuoj de sia amo. Kvazaŭ la ŝuoj transformiĝis al io pro kio li donacus volonte sian koron, plej belajn sentojn, donacus ĉion kion li havis, por kiuj li ĉirkaŭbrakis la solecon. Sed ne, ne bezonatos, la ŝuoj ekscios lian sakrificon, neniam postulos de li ion.

Li konservos ilin porĉiame en sia dormoĉambro, tie en Birmingamo. Eble en la plej malgranda muzeo de la mondo, muzeo kun ununura eksponaĵo trans la montrofenestro- ŝiajn adiaŭajn ŝuojn. Neniu ekscios, nur li kaj la ŝuoj, ke kio estis en sia koro. La lasta kozo petota de kelkiu estos ke, kiam li forpasos al la transa mondo, oni entombigu lin kune kun ili, survestite.

Per tiome Zgjim estis konvinkite ke li neniun enuigos- tial sendube estos ununura sia demando, la lasta sia deziro.

En tia stato estis alveninta Zgjim, al li la mondo ŝajnis rifuĝota porĉiame en la gorĝoj de tiuj ŝuoj, ŝajnis ke li postrestos soleca por la tuta vivo. Aliflanke, kvazaŭ li apenaŭ kontraŭus se li perdus la koron pro io inda, ŝi estis ĉio, pli ol unu revo. Zana estis la principo de siaj songoj, sendepende de la

cirkonstrancoj kaj la realo. Tiel li komprenis sian “mondon” de la amo, tiel li estis knedita en sia koro per revoj dumjare, tiel li kredis kun la tuta koro kaj rezono.

Vespere forirante, li ne diris “Adiaŭ”..ne diris iun dolĉan vorton, lia voĉo estis premita pro doloro kaj malmoleco, nek li ĉirkaŭbrakis ŝin. Tiel blokita pro la doloro li ne sukcesis disiĝi dignece. Nek ŝi diris ion, stoikece trankvila kaj silenta, fiksita pro la bedaŭro, kondukis lin senlarmede. Tamen Zgjim unuafaje esploris ke ŝia vizaĝo estis paliĝinta, ne plu aperis tiu dolĉa rideto, la anĝelaj okuloj ne plu havis brilon. Ĉu ŝi estis konsciiĝinta, kvazaŭ estis kompreninta iome ke “nevole” ŝi estis erarinta!

“La virina koro similas al oceano plenplene de sekretoj...”, li apenaŭ povis ekscii tion. Sed io profunde en si diris ke “memkonsciiĝo” ŝia estis vera. Finfine li deziris ke estu tiel, kvankam nenio povus malfariĝi...neniam.

Enesperantigis



Bardhyl Semini (Albanio)



Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,
Chongqing, 400020, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

